



# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 31<sup>a</sup> jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k111/k111.html>

Insurrekcio, ne puĉo

Tial ne voĉdonis mi ilin



Clara Wieck

Kial Hispanio malamas sian islaman pasinton?

N<sup>o</sup> 111<sup>a</sup>

Decembron 2019



# Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj  
(HALE).

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3° D  
30010 Murcia  
Hispanio

## Enhavo

<b>Redaktore:</b> Klare heredigis nin Klara.....	3
<b>Politiko:</b> Insurekcio pli ol puĉo.....	6
Tial mi ne voĉdonis	
Santjagon.....	7
Alberton.....	8
Paŭlon.....	9
Kasadon.....	10
Petron.....	11
<b>Historio:</b> Kial Hispanio malamas sian islaman pasinton?.....	12
Kristnaskon Feliĉan.....	15
<b>Literaturo:</b>	
<i>Don' Huan</i> , ĉ. 6 <sup>a</sup> : Bremsanta o...	16
<i>La Faraono</i> , ĉ. 60 <sup>a</sup> .....	18

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,  
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun  
artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies  
enhavo mistraktas nenium personon.

Oni povas reprodukti la enhavon,  
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj  
respondekas ties aŭtoroj, ne la  
redakcio.

**Kovrilo:** La 13<sup>an</sup> de septembro Clara Wieck, plej konata per sia edzo, Robert Ŝuman, ducent jariĝis. Mi ne kuraĝas diri, ke ŝi ne plu vivas, ĉar ĉiun momenton, kiam oni aŭskultas unun el ŝiaj 140 verkojn, ŝi denove vivas. Ni parolas pri ŝi en niaj paĝoj.

**Pagmaniero:** aliĝu al HALE kontraŭ €5 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino. Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

**Konto** **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

**Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com**

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:  
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, gFtp kaj yafc.

Nesubskribi-  
tajn artikolojn  
verkis la re-  
daktoro.



Redaktore

## Klare heredigis nin Klara

La 13<sup>an</sup> de septembro dujarcentiĝis la tago, kiam Clara Josephine Wieck naskiĝis en Leipzig, Germanio. Siatempe ŝi elstaris kiel brila pianistino, kaj ne miru ni pri tio, ĉar ŝia patro, Federiko Wieck lernigis ŝin pri muziko kaj piano de kiam ŝi estis nur naŭ jaraĝa.

Ŝi ankaŭ kreis 140 verkojn, sed ŝia ĉefa merito, laŭ mia modesta eltrovo, estas, ke provizis al ni per la muziko de sia edzo, Robert' Ŝuman, kiun oni eble ne aŭdus en modernaj koncertejoj, se ŝi ne klopodintus disvastigi ĝin pere de siaj multnombraj koncertoj dise tra Eŭropo dum pli ol 40 jaroj.

La patro de Klara, S-ro Federiko Viik', instruis sian filinon pri muziko kaj piano de kiam ŝi aĝis nur 9jare, kaj kvar jarojn poste ŝi faris sian unuan koncerton en Leipzig kun la fama orĥestro Gewandhaus. Ŝi konis faman poeton Goete-n kaj muzikistojn Mendelssohn-on, Ŝopin-on kaj Paganini-on, kaj Brahms ŝi havis rilaton aparte artisman kaj intelektan ĝis sia morto.



Dekkvar jaraĝa Klara ludas pianon.

kun Johano

Dum sia vivo ŝi estis konata kiel unu el la plej bonaj pianistinoj el la mondo.



Geedzoj Ŝuman' je 1847.

Kiam ŝi estis 11-jaraĝa ŝi konis Roberton Ŝumanon, kiun Federiko instruis pri muziko kaj piano. Dek jarojn poste ili decidis geedziĝi, sed ŝia patro ne aprobis tion, kaj ili devis fuĝi kaj venki juran procedon por ke juĝisto permesu, ke ili du geedziĝu. Sed ili estis feliĉaj ĝis la morto de Roberto, dek ses jarojn kaj ok gefilojn poste. Dum la sekvintaj kvardek jaroj, ŝi disvastigis la muzikan verkaron de sia edzo, kion ŝi faris kompetente el la klavaro, ĉar oni konsideris, ke ŝi estis unu el la plej bonaj pianistoj el la mondo siatempe.

Roberto Ŝuman' ne nur estis komponisto kaj pianisto, sed ankaŭ li eldonis magazinon, la *Neue Leipziger Zeitschrift für Musick*, tio estas, *Nova Magazino de*



*Lejpsig pri Muziko*, per kiu li verkis artikolojn pri tiutempaj novaj komponistoj Ŝopin', Liszt, Berljoz' kaj similaj, kiujn oni nun konsideras mondfamaj kaj solidaj. Kiel muzikisto kaj direktoro de orĥestro, li aranĝis kaj ludis diversajn muzikajn pecojn de majstroj de l' pasinto, kiel Baĥ' kaj Beethoven'. Li inventis meĥanisman por plifortigi sian kvaran fingron, sed provante ĝin sur si mem, la rezulto estis malbonŝanca: li ne plu povis ludi pianon koncerte. Tio estis frustriga, evidente, sed malfermis al li novan karieron kiel komponiston ekskluzive, kaj de tiam la manoj de Klara estos tiuj, kiuj premieros kaj de tiam ĉiam portos la muzikon de Roberto en la mondon. Pro tio oni diras, ke la plej

grava atingaĵo de Klara Vik' estis, ke ŝi donacis al ni la muzikon de sia edzo, Roberto Ŝuman'.

La kompatinda geniulo intencis memmortigi, kaj devis eniri mensmalsanulejon (fakte li diris, ke li aŭdas sinsekve la noton La<sup>5</sup>, la plej akutan noton A en piano) kaj vidas anĝelojn kaj demonojn, kiuj atakos Klaran kaj lin), kaj eĉ edzino ne estis permesata viziti lin. Finfine li mortis pro koratako du jarojn poste, kvankam kelkaj historiistoj aljuĝas lian morton al sifilizo, eble erarante pri la nomo, ĉar estis Ŝubert', alia geniulo, tiu, kiu mortis pro tiu terura malsano. Roberto kaj Klara amis multe unu la alian, kaj ne estas logike pensi, ke tiu terura malsano transmitebla per sekso infektis Ŝumanon kaj ne Klaran.

Kiel dirite, post lia morto, edzino Klara disvastigis la verkaron de Roberto Ŝuman' dum siaj ceteraj kvardek jaroj da vivo. Nun ili du ripozas kune en la cimiterio de Bonn, Germanio.

Nun feministoj reivindikas la nomon Klaran Wieck-n, kiel progresisman virinon. Fakte, ŝi estis pretigita por artisma vivo de sia patro, Federiko Wieck, kaj ŝi devis multe labori pere de sia ilo, piano, por subteni sian sepgefilan familion ĉar sia edzo ne povis helpi ŝin pro sia handikapita mano kaj sia frua morto. Ŝi mem ne konsideris sin tre kompetenta komponisto, kvankam ŝiaj verkoj ŝajnis kontraŭdiri tion. Iel ajn, Klara Wieck havis fruktodonan vivon kaj eniris la historion de Muziko kaj homaro per sia propra rajto.


## Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago por Toleremo, 16<sup>an</sup> de novembro de 2019

**E**n epoko kiam la mondo alfrontas defiojn pli grandajn ol iam ajn antaŭe, kaj kiam demandoj kiel ekzemple klimatsanĝiĝo kaj nuklea milito prezentas ekzistominacojn ne nur al la homaro sed eĉ al la planedo, toleremo estas hodiaŭ pli grava ol iam en pasinteco. Nur per transpontado de niaj diferencoj ni povos kontraŭstari la problemojn kiuj ĉirkaŭas nin. Sed, bedaŭrinde, ne ekzistas lando en la mondo kiu ne spertas maltoleremon en unu formo aŭ alia – pri raso, religio, genro kaj multaj aliaj diferencoj, kiuj devus fortigi nin per diverseco, sed tro ofte rolas por malfortigi nian decidemon kaj dislokigi nin for de la esencaj defioj kiuj ĉirkaŭas nin. En multaj landoj kreskas politika ekstremismo, kaj malamo anstataŭas komprenon. Neniam internacia kunlaboro pli gravis, ol ĝi gravas hodiaŭ.

Fundamenta al tiuj diferencoj estas la diferenco de lingvo. Se ni ne povas interkompreniĝi, ni ne povas kunlabori; se ni ne povas interkompreniĝi, ni emas plej malbone imagi pri tiuj kiuj estas malsamaj al ni. Okaze de tiu ĉi **Internacia Tago por Toleremo**, Universala Esperanto-Asocio apelacias al internaciaj organizaĵoj kiel Unuiĝintaj Nacioj, al registaroj tra la mondo kaj al ĉiuj homoj de bona volo, ke ili laboru por serĉi signifoplenan dialogon, ke ili flankenmetu siajn diferencojn kaj ke ili kunlaboru en spirito de toleremo por alfronti la defiojn kiuj jam kontraŭstaras nin ĉiujn. Ni promesas nian kunlaboron en tiu klopodado.

### La nepo mortis!

Ni ĵus eksciis, ke la nepo de Zamenhof, D-ro Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, mortis la 9<sup>an</sup> de oktobro, je sia 95<sup>a</sup> jaraĝo. Li havis plenan kaj longan vivon. Ripozu li pace.



## Insurekcio pli ol puĉo

de Alberto Buela

Antaŭ multe da jaroj Jozefo Ludoviko Torres (1901-1965), akuzisto de *Fifama Jardeko*, donacis al mi la libron de la plej grava politika bolivia pensisto Karlo Montenegro (1904-1953), *Naciismo kaj koloniismo*, per kiu li subtenas, ke "La eksterordinara ploriferado de insurekcio nutras sin de antagonismo nekuracebla nesolvita ekde la Milito de Sendependeco..., estas insurekcio je la subgrundo de patrio kvazaŭ semo apenaŭ kovrita de tertavolo de respublika ordo. Insurekcio estas unu el la formoj de esprimado, kiu prenas la lukton el la du emoj, koloniisma kaj naciisma de la fondiĝo de Bolivio".

Evo Morales' reagis dekomence bone parolante kiel boliviano pri insurekcio, sed poste, koloniigita de amasmedioj, li komencis paroli pri puĉo. Tamen, li reagis kvazaŭ la afero estas insurekcio, ĉar en ĝi riskas sia vivo kaj li fuĝis eksterlanden.

Diferenco kun puĉo estas, ke ĝi estas io planita, kie ĉiu puĉisto scias tion, kiun ŝtatarparaton li okupos, dum insurekcio estas spontana, mankas al ĝi gvido kaj ĝia celo estas la kapo de la prezidento. Tio okazis al Berzu', Villaruel', kaj tiomaj aliaj.

Intenci serĉi preter insurekcio, ĉiam spontana kaj perforta, la manon de imperiismo, kiel maldekstro volas, estas grati tie, kie ne pikas, Insurekcio estas ka ekstrema formo da mestizo, kiu subtenas ĝis li eksplodas, kaj eksplodas ĉie ajn. Pro tio insurekcio ne havas gvidon, kiel puĉo, kaj ne havante ĝin produktas, ĝenerale, sorĉistinserĉadon kaj sendiskriminacian persekutadon de rivaloj. Pro tio Evo petis protekton por siaj familianoj je la momento de sia demisio.

La respublika ordo povas fari nenion kontraŭ insurekcio, ĝi nur havas reklamacion funkcion, same kiel okazis pri la Grupo Puebla kaj ties unuiĝintaj progresemoj.

La bolivia insurekcio estas la eksciecia stato de eŭropanoj, ĝi estas mallongdaŭra, sed ekstreme perforta kaj kruela. Mi memoras, ke kiam mi estis invitata en La Paz de mia amiko Andreo Soliz Rada, parolante pri la temo, li diris *La insurekcio Fuenteovejuna de Lope de Vega estas ĉiuj kaj neniu*.

Estus dezirinde, ke tiom da ĉio-sciaj ĵurnalistoj kaj sciencistoj politikaj pristudu iomete la temon antaŭ li aŭ ŝi parolos...

## Politiko

## Tial mi ne voĉdonis Santjagon

**S**antjago kaj premu Hispanio! estis la batalkrio de hispanoj dum la rekonkero kontraŭ muslimoj dum la lastaj sepcent jaroj de Mezepoko. Nun tiu estas la slogano (etimologie: batalkrio) de VOX (etimologie: voĉo, en la latina lingvo), la partio gvidata de Santjago Abaskal. Oni vidas, ke ties parolado estas por Hispanio kaj unuiĝo, kaj tio okazigas, ke aliaj partioj sendistinge nomigas lin kaj siajn partianojn faŝistoj, ksenofobiistoj, seksistoj, kaj aliaj insultoj eĉ pli gravaj. Tio ja estus sufiĉe bona rekomendo voĉdoni por tiu partio, komprenante kiom da damaĝo la ceteraj partioj jam kaŭzis al Hispanio, tio estas, al ni ĉiuj hispanoj, cefe al ties voĉdonantoj, kiuj ne kuraĝis kritiki ilin, kaj sekve iĝis iliaj komplicoj pri forrabo de suvereneco kaj pri perfido kaj korupteco.



Tamen VOX kunhavas gravajn erarojn al ceteraj partioj politikaj: ĝi celas iĝi ŝtata partio, anstataŭ nacia partio. Tio estas, ĝi celas partopreni la ŝtaton, kaj ne la popolon de Hispanio. Per favora balotado al ili, ili iĝos parton de la ŝtato, ne de la nacio. Post kiam ili estos en povo, ili povos donaci bonajn postenojn al siaj partianoj kaj subtenantoj, same kiel la aliaj partioj faris dum la lastaj 40 jaroj, kaj la reĝimo de Diktatoro Fransisko Franko faris la antaŭajn 40. Aldone, ili anoj de la registaro kaj la deputitaro ĝuos la privilegion ne esti juĝata de normala juĝisto, kiel ni ĉiuj, sed de la Supra Tribunalalo, kondiĉe, ke la Kongreso de Deputitoj permesos tion. Ili diras, ke ili forprenos la aŭtonomiojn, kaj tiu ĉi estas la unua fojo, kiam oni parolas pri tiu afero. Pli facile dirite ol farite, kvankam mi aprobas tian entuziasmon, esperante, ke ili iam sukcesos malaperigi tiun kanceron de la bonfarto de Hispanio. Sed ili ne defendas la liberecon kolektivajn por hispanoj, nur individuajn, kaj tio ne sufiĉas.

Jes, eble ili faros aferojn aliel, sed tio ne sufiĉas. La reĝimon politikan reganta en Hispanio nun oni ne povas ŝanĝi el interno. Oni ja devas elimini la artikolon 99<sup>an</sup> de la Konstitucio, kaj ankaŭ la 6<sup>an</sup>, kaj tiom multajn aliajn, ke preferinde oni eliminu la tutan Konstitucion kaj kreu novan fare de parlamento elektita tiucele. Sed neniuj partioj, eĉ VOX, parolis pri tio. Do, ili ne estas por kolektiva libereco aŭ reprezenteco de civitanoj, kaj eĉ se ili parolas pri apartigo de povoj, mi ne estas por ili.

Politiko

## Tial mi ne voĉdonis Alberton

**CIVITANOJ** estas partio fondita kontraŭ sendependismo, sed ne certas mi pri tio, ke ĝi defendas hispanajn kulturerojn kontraŭ moderna korekteco politika. Ties anoj parolas pri Hispanio, certe, sed ne pri ni.

Ĉu CIUDADANOS gvidas diskurson pri taŭroludo, Semajno Sankta, kaj aliaj hispanaj tradicioj? Oni ne nepre devas esti religiema defendi tiun lastan, aŭ taŭrluda amanto por defendi tradicion, kiu estas atakata nur pro tio, ke ĝi estas hispana...

Jes, dekomence la partio gvidata de Alberto Rivera kaj Ines' Arrimadas estis io bona kaj necesa en la politika etoso hispana, sed nun ŝajnas, ke ili dubas pri tio, kion fari. Ili ne donas certecon al ni pri tio, kion ili faros en la registaro. En Andaluzio ili rifuzas saluton kaj kunlaboron al VOX pro tio, ke ili ankaŭ subtenas la mensogon pri ekstremdekstrismo VOXa, kio estas evidenta mensogo, ĉar en la parolado de tiu lasta estas eĉ ne unu referenco al perforto aŭ ideoj ekstremaj, kiel en aliaj landoj ekstremdekstrismo petegas. Kaj ĉi tie naciismaj partioj kaj ekstremmaldekstrisma partio PODEMOS, ekzemple pri dialogo kun tiuj, kiuj volas rompi Hispanion.



Jam en Hispanio politikistoj ne ariĝas laŭ dekstro aŭ maldekstro, sed laŭ supro kaj malsupro. Politikistoj iĝis kasto, ili konsistigas novan rason, kiu vivas sur modestaj hispanoj, kies nura posedaĵo estas sia laboro..., kiam ili sukcesas havi postenon.

Mi ne vidas en CIUDADANOS la emon zorgi pri ni, malmultekostigi nian vivon, protekti niajn tradiciojn kaj kutimojn, eĉ protekti niajn bordojn, sed ili ankaŭ ŝajnas sklavigi al postuloj de politika korekteco. Kaj pro tio mi ankaŭ ne voĉdonis por Alberto.

Nun la balotado donis nur dek sidlokojn al CIUDADANOS, kaj la reago de Alberto Rivera estas demisii kaj ne plu okupiĝi pri politiko. Mi kredas, ke tio estas honesta, persone, sed malutila al sia partio. Li devus resti iom da tempo kaj helpi sian anstataŭanton preni la gvidadon de la partio..., aŭ eble li mem korekti la gravajn problemojn, kiuj okazigis tiom malbona rezulto por la partio. La ŝipestro submariĝu kun sia ŝipo, ĉu ne?

Nun Alberto Rivera estas normala civitano hispana, sen emo al povo. Mi certas, ke li jam pentas pri sia hasta decido, ĉar nun la partio estas sen klara gvidado aŭ politiko. Ĉu la restantaj dek deputitoj de lia partio apogos aŭ malapogos la registaron?



## Politiko

## Tial mi ne voĉdonis Paŭlon

**N**i finu la kaston! estis la batakkrio de PODEMOS kiam tiu partio komencis eltranĉe de la popola movado 15<sup>a</sup> de marto, alidirite **15-M**. Tamen hodiaŭ oni ne povas nei, ke Paŭlo Iglesias, la gvidanto de PODEMOS apartenas al tiu kasto politika, kiun li tiom akre denoncis tiam.

Aldone, li difinas sin mem (tamen ne sian movadon aŭ partion) kiel komunisman. Kaj estas bone, ke oni agnosku sian personan politikan sintenon..., sed kion bonan faris komunismo por Hispanio en la pasinto? Laŭ mi estas tre danĝere donaci al komunisto la ŝlosilojn de la riĉeco kaj respondeco de Hispanio. Laŭ mi, oni prudente ne faru tion post tio, kio okazis en Hispanio en la lasta jarcento, kiam ili atingis povon registaran. Eble oni povas aserti, ke



UNIDAS PODEMOS (unuiĝintinoj ni-povas) ne estas Paŭlo Iglesias, sed oni rimarku, ke el ĉiuj unuaj gegvidantoj de la partio restas nur ununura Paŭlo, kio kongruas al la sinteno de komunismaj reĝimoj ĉie en la mondo, pri kulto al gvidanto, same kiel al Ŝtalino, Kastro, Maduro, kaj tiel plu. Ne, mi opinias, ke estas danĝere doni tutan povon de lando al komunisto aŭ al ties servanto. Pro tio mi ne voĉdonis Paŭlon, eĉ se mi opinias, ke multajn el liaj ideoj estas bonaj kaj farendaj. Sed mi dubas, ĉu li efektiviĝos ĝin kiam li estos en povo.

Nun Pedro Sánchez subskribis antaŭkonsento por ke Paŭlo Iglesias estos vicprezidanto en la registaro de Hispanio. Tio timigas multajn hispanojn, sed estos aliaj du viceprezidantoj, kaj mi dubas, ĉu li havos decidan povon, kvankam sian duan celon li atingos, laŭ mia opinio: eniri la registaron de Hispanio. Sed ankoraŭ estas tro frue distrumpeti la aferon: la funkcia Prezidento ankoraŭ ne havas sufiĉe da apogo de la ceteraj deputitoj, kaj se tio ne okazas, tria balotado efektiviĝos en Hispanio en la baldaŭa estonto. Mi konsideras, ke tio estos pli bona ol malbona por ni ĉiuj Hispanoj: tiu ĉi reĝimo havas tiun balaston denaske, kaj jam estas tempo por ŝanĝi la esencon de nia Konstitucio, kaj eble ĉifoje oni sukcesos konstrui novan pere de la volo de la popolo, ne de politikistoj, kiuj reprezentas neniun.

## Politiko

## Tial mi ne voĉdonis Kasadon

**P**or ĉio, kio unuigas nin estas la slogano de Partio Popola dum la balota procedo de 2019. Sed tion tiu partio ne faris tiam, kiam estis necesa, antaŭ du jaroj, kiam la konstitucia Prezidento de la Kataluna Aŭtonomio proklamis sendependon de Hispanio, kaj la sekva aplikado de artikolo 155<sup>a</sup> de nia Konstitucio. Ĉu ni fidi partion, kiu obeas politikan korektecon anstataŭ niajn leĝojn? Jes, mi komprenas, ke Paŭlo Kasado ne gvidis ĝin tiam, sed mi preferas kredi, ke partio ne estas homo, sed anaro da homoj kun komuna ideologio aŭ idealo. Kaj la idealon konservi Hispanion unuiĝinta ne estis plenumata de tiu partio, kiu laŭ mi perfidis tiam Hispanion, tio estas, nin ĉiujn.



De kiam komencis tio, kion oni nomas *demokratio*, en nia lando, kreiĝis nova partio, Alianco Popola, al kiu aliĝis diversaj personoj, kiuj rolis en la antaŭa reĝimo, kiel Manuel Fraga Iribarne, iama ministro pri Informado kaj Turismo (tio estas, propagando, interalie). Li kaj Santjago Kariljo (fama komunisto al kiu oni supozas gravaajn krimojn dum la Intercivitana Milito) ĉefrolis la ceremonion pri pardono kaj amnestio, entombigante por ĉiam malnovajn rankorojn kaj malamojn. Poste oni ŝanĝis la nomon de la partio al Popola Partio, kaj tiel Jozefo Maria Aznar sukcesis iĝi Prezidento de Hispanio je 1996, bedaŭrinde kun helpo de sendependistoj katalunaj, al kiuj li devis pagi per politikaj favoroj, kiuj nun ni pagas per malamo de katalunoj junaj al cetera Hispanio kaj hispanoj. Poste, je la jaro 2000<sup>a</sup>, li atingis absolutan majoritaton, sed li ne nuliĝis la socialisman leĝon pri edukado, LOGSE, kiu punas memdisciplinon kaj meriton, ĉar ideologiismo socialisma postulas, ke ni ĉiuj estu egalaj ne nur pri rajtoj, sed pri ĉio alia, kaj sekve ĉiuj devas sukcesi en lernejo, eĉ se oni ne scias ion ajn. Li pasigis leĝon pri malpliaĝulo, forprenante de neplenkreskuloj tutan respondecon prileĝan, kio certe ne preparas ilin por vivo kiel respondecaj civitanoj.

Jes, la plej grava argumento kontraŭ PP estas ĝia propra historio. Veras, ke ĝi solvis la problemojn ekonomikajn kaŭzitaj de PSOE dum tiu estis en povo, sed ekonomio ne sufiĉas, se oni ne dignigas la nacion kaj la civitanaron. Kaj tiuteme PP fiaskis.

## Politiko

## Tial mi ne voĉdonis Petron

**C**ent jaroj da honesteco! proklamis slogano de partio socialisma laborista hispana, PSOE, je la komenco de la reĝimo postfrankisma, kiun multaj ignorantoj nomas **Demokratio**, ĉar ili ne scias pri tio, kio demokratio estas. Sed mi dubas pri tiu honesteco, kiu ne ebligis deputitojn socialismajn voĉdoni por la rajto de virinoj voĉdoni, aŭ persekuti krimulojn dum sia regado kiel registaro de Hispanio je la 30aj jaroj de la lasta jarcento. Ankaŭ ili ne estis honestaj, kiam ili propagandis kontraŭ NATO, kaj jam en povo ili sukcesis igi la popolon voĉdoni jese al ĝi 40 jarojn poste.

Ĉu estis honeste krei teorisman grupon GAL, por kontraŭi murde murdistojn de ETA? Dum la longa regado de PSOE de Felipe Gonsales, korupteco komencis en Hispanio, kaj tio ne ŝajnas honesta procedo... Jes, korupteco estas interna trajto de ĉi tiu reĝimo, sed PSOE faris nenion kontraŭi ĝin dekomence.



Pri la agado de la dua regado socialisma en nia lasta historio, tiu de Jozefo Ludoviko Rodrigues Sapatro, ni jam parolis, nesciante ankoraŭ ĉu liaj misfaroj venas pro ĉu turpeco, ĉu malico, sed Petro Sanĉes vere ricevas heredaĵon de kaj Felipe kaj Jozefo Ludoviko, eĉ nevolante. Senkulpigi pri iliaj misfaroj supozas malkrei la partion PSOE kaj fondi novan, eĉ se per la sama ideologio. Laŭ mi, vera hispano ne povas voĉdoni por PSOE ĉar neniu alia partio vundis nian nacion tiom multe kiel tiu partio, kiu neniam sciis kion fari favore al Hispanio kaj ties civitanoj kun la povo kiun senkondiĉe hispanoj donis al ili je 1982 kaj 2004.

Sed la intencitaj paktoj de Petro ne permesas dubon pri lia soifo pri povo, sengrave al kia kosto. Li nenion faris pri la gravaj eventoj en Barcelono kaj cetera Katalunio, kaj sekve oni ne povas trankvile vivi tie, ĉar polico kaj ceteraj ŝtataj institucioj ne garantias komunan, pacan vivon. Tiel mi ne voĉdonis petrosanĉesan PSOE-n.

Li nun manovras kapti apogon de deputitoj de aliaj partioj. Mi kredas, ke neniu falos en tiu kaptilo, time al veno de PODEMOS en lia registaro, kaj finfine ni havos trian balotadon por la bono de Hispanio kaj eble plibonigo de socialismo.

## Kial Hispanio malamas sian islaman pasinton?

Laste mi trovis tiun diskuton en interreta grupo *La legendo nigra*: *Kial Hispanio malamas sian islaman pasinton?* Kompreneble, estis diversaj reagoj, multaj el ili nehavante historian apogon. Multaj el ili fakte ne parolis pri *islama*, sed *maŭra* pasinto. Interkrampe mi aldonu, ke mi aŭdis de multe da jaroj, ke la vorto *maŭro* estas malafabla vorto, preskaŭ fivorto inter ni, escepte de ĉe la popola vortgrupo **Festumado de Maŭroj kaj Kristanoj**. Tamen, tiun aserton mi trovas troiga kaj sensenca, ĉar la vorto mem venas el greka lingvo *Μαῦρος*, signifante *tiu, kies haŭto estas malklara*, laŭ la Vortaro de la Reĝa Akademio de Lingvo Hispana. Inter ties 11 subsignifoj, estas 3<sup>a</sup>. *Tiu, kiu praktikas la islaman religion*, kaj pro tio decas uzi *maŭron* kiel *islamanon*, laŭ mi.

Diskutoj kiel tiu ĉi montras, ke mankas al averaĝa hispano sufiĉe historia kaj kultura pretigadoj diskuti aferojn tiom niajn, ĉar oni miksas diversajn historiajn periodojn, kaj sekve oni atingas erarajn konkludojn. Oni forgesas, ekzemple, ke

ne estas same **nacio** kaj **ŝtato**. Ĝis la dekoka jarcento oni ne difinis tion, kio ŝtato estas, **sed tio ne signifas, ke ŝtatoj ne ekzistis antaŭe**, same kiel la gravitacia forto ekzistis milojn da milojn da jaroj antaŭ Izaak' Njuton' difinis ĝin. Romio, sekve, estis ŝtato, kaj ĝi kreis Hispanion, provincon romian sur la Iberia Duoninsulo. Poste romianoj dividis ĝin po **Hispania Citerior** (Hispanio *de ĉi tie*) kaj **Hispania Ulterior** (Hispanio *de tie, pli fora*). Sed tamen, ambaŭ Hispanioj. Kio ekzistis antaŭ Romio kreis la provincon? Multe da diversaj triboj kaj popoloj, kiel kalaekoj, asturoj, kantabroj, lusitanoj, bastetanoj, oretanoj, kaj multaj aliaj, kies latinajn nomojn oni trovu en supra bildo. Notu, ke nunaj mursjanoj, ekzemple, tute ne rilatas al tiamaj bastetanoj, krom per uzo de la sama teritorio.



Oni diskutas, ĉu Hispanio ekeksistis de la momento, kiam Karlo 1<sup>a</sup>, heredinto de la Katolikaj Gereĝoj, komencis regi la landon. Sed tio, kion li vere heredis

estis la hispanan ŝtaton. La nacio ekzistis de pli ol jarmilo kaj duono antaŭe, kvankam ĝi kreskis sur tutan alian kontinenton, Amerikon.

Sed intertempe, inter la romia konkero, kiu fakte kreis nacion tie, kie antaŭe estis nur aro da triboj kaj kulturoj diversaj, kaj la ekregado de Karlo 1<sup>a</sup>, estis du gravaj invadoj en la lando. La unua venis el nordo kaj datumiĝas je la jarcento 6<sup>a</sup>, de **gotoj**, tio estas, germanaj triboj, kiuj konkeris la teritorion, sed estis kulturigitaj de ties civilizacio, kaj sekve ili akiris la lingvon, kutimojn kaj eĉ la religion, kiujn la popolo hispana jam praktikis. Tio estas, **ili devenis hispanojn**, kaj sekve ili regis la sendependan reĝlandon Hispanion. Du jarcentojn poste venis **islama invado** el sudo kaj datumiĝas je la jaro 711, tio estas, la jarcento 8<sup>a</sup>, sed grava diferenco estis, ke **ili ne miksiĝis kun la surloka nacio**.

Dekomence, ili altrudis sian lingvon, la araban, kaj kutimojn kaj religion. Muslimoj ne pagis impostojn, male al nemuslimoj. Fojfoje ili konvertigis homojn kontraŭ mortopuno; se muslimo deziris edziĝi al kristanino, ŝi devis akiri la musliman religion, sed muslimino ne povis edziniĝi al kristano, kontraŭ mortopuno. Judoj estis pli tolerataj ol kristanoj, kaj fakte ili iĝis funkciuloj de la muslima ŝtato en Hispanio. Ne mirinde estas, ke la hispana nacio finfine sukcesis forpeli la musliman ŝtaton de la lando, eĉ se tiutempe ne estis ununura hispana ŝtato, sed diversaj ŝtatetoj, regante la hispanan nacion. Tio okazis finfine je 1492, kiam la Katolikaj Gereĝoj venkis la musliman ŝtaton de Granado kaj unuigis la tutan landon.

Do, kie estas la muslima pasinto de Hispanio? Certe, estas multaj nomoj geografiaj devenantaj el la araba lingvo, kiel *Almería*, *Alhambra*, *almazara*, kaj tiel plu, sed tio ne signifas, ke la hispana lingvo devenas el la araba, same kiel la franca ne devenas el la angla, eĉ se ĝi enhavas multajn anglismojn. Tuj post la konkero de Granado, la hispana ŝtato forpelis la muslimojn el sia teritorio, **se ili ne konvertiĝas al kristana religio**. Tiun eblecon muslimoj ne donis al kristanoj dum la muslima ŝtato de Hispanio. Kelkaj konvertiĝis, certe, kaj pro tio ili ekestis hispanoj laŭleĝe. Certe estis antaŭjuĝo inter la popolanoj pri pureco da sango, kaj tiucele oni publike fieris manĝi porkan viandon, por ke oni vidu, ke oni ne estas muslimo aŭ judo. Post sep jarcentoj da malamo al muslimoj, homoj fieris ne esti tio.

Jen granda diferenco inter gota kaj muslima invadoj de Hispanio. Je la 19<sup>a</sup> jarcento estis tria invado de Hispanio, tiu de francoj sub Napoleon'. Hispanoj sukcesis forpeli ilin ankaŭ. Pro tio ni ne indentiĝas kun francoj aŭ muslimoj, sed ni ne povas nei nian identecon kun gotoj kaj romianoj, kaj certe, se oni esprimus malamon al nunaj germanoj aŭ italoj pro tiuj prainvadoj, oni certe ridindiĝus laŭte. Tamen, tio okazas en Sudameriko nun pri la *hispana invado*, laŭ ili. Ni ne povas plendi kontraŭ Italio pro la romia invado, ĉar tiutempe ni ne estis hispanoj, sed sur nia nuna teritorio loĝis diverstribanoj, kiuj neniel

rilatas al nunaj ni, kaj sekve ni ne povas plendi kontraŭ Germanio, ĉar gotoj iĝis hispanoj pro mikso kun la aborigina popolo, kaj aldone kreis la hispanan ŝtaton, ebligante la lanĉadon de la hispana kulturo, kiu ebligis la konkeron de tuta kontinento jarmilon poste.

Do, pro tio, oni ne povas aserti, ke hispanoj malamas la islaman pasinton, ĉar tio neniam ekzistis. Estis nur invadinta popolo, kiu finfine estis forpelita de la lando, do ni havas nenion komunan al ili. Nun kelkaj muslimoj revas pri reakiro de tio, kion ili iam invadis, sed tio ne okazos. Tiuj islamanoj malamas Hispanion pro tio, ke Hispanio venkis ilin. Sufiĉa simileco estas en tio, ke ankaŭ komunistoj malamas Hispanion pro tio, ke Hispanio estis la unua nacio, kiu venkis ilin. Pro tio maldekstro favoras islamanojn nun, kvankam mi konsideras, ke ili estas nur kunvojaĝantoj. Kaj historio diras al ni, ke ĉiam, kiam unu el ili akiras povon, ĝi malpermesas la alian. Interese, ĉu ne?



Teritorio regata de islamanoj dum sep cent jaroj, alidirite Al-Andalus

## Kristnaskon Feliĉan

**M**i deziras feliĉan kristnaskon kaj Ĝojigan Novjaron 2020 al la legantoj de *Kajeroj el la Sudo*.

Estas kutimo gratuli homojn okaze de datrevenon de ties naskiĝotago, sed ankaŭ estas ĝoje, ke oni povas malfermi novan almanakon, kaj konstati, ke oni ankoraŭ vivas per bona sanstato, kaj tiuj, kiuj estas karaj al oni, ankaŭ estas en bona sanstato ĉirkaŭ oni. Kaj tio ĝojigu vin ĉiujn laŭ fruktodona nova jaro 2020.

De kiam Jesuo de Nazareto naskiĝis, estas kutimo por ties sekvantoj, alidirite kristanoj, festi lian naskiĝotagon. Poste, je la kvara jarcento imperiestro romia Konstantino deklaris Kristanismon kiel la oficialan religion de sia Imperio, kaj pro tio de tiam Eŭropo kaj kelkaj aliaj landoj de Afriko kaj Azio komencis festi ĝin sendepende ĉu oni estas kristano, ĉu ne, sekve aldonante novan kultureron al nia civilizacio. Sed ne estas sufiĉe klare kiu estis la ekzakta naskiĝtago de Jesuo de Nazaret', ĉar Konstantino decidis, ke tio okazu vespere la 24<sup>an</sup> de decembro, kaj la venintan tagon oni festumu pri tio, ke li jam naskiĝis, kaj tiun tagon li nomumis **Kristnaska Tago** (*Navidad* aŭ *Natividad* hispane, *Christmas* aŭ *Xmas* angle, *Noël* france, kaj tiel plu) kaj ne plu estos la *Saturnalia*, la festo de dio Saturno, kiun romianoj celebris tiun tagon de sep jarcentoj por celebri, fakte, la vintran solsticon, tio estas, la tago, kiam la sekvontaj tagoj estos pli kaj pli longaj (fakte tio estis la 21<sup>a</sup>, ne la 25<sup>a</sup>).

Moderna analizo de la evangelioj pensigas al ni, ke se la ŝafistoj dormintus ekstere kiam anĝeloj venis anonci al ili la bonan novaĵon, kiel **La Sankta Libro** diras, malvarmo certe mortigus ilin. Pro tio, oni pensas, ke Jesuo naskiĝis iun tagon inter aprilo kaj septembro, kaj kelkaj homoj eĉ kuraĝas diri, ke li naskiĝis aŭguston, la 21<sup>an</sup>! Sed kiel verkisto Isaac Asimov diras en sia verko **La planedoj en siaj kursoj** parolante pri Horoskopoj, *se oni aldonas iom da plua sensencaĵo al granda sensencaĵo, oni ne rimarkos*. Mi ne asertas, ke la naskiĝo de Jesuo estas sensenca, sed nur, ke oni ne scias kiam ekzakte li naskiĝis, eĉ se oni ja scias la daton, kiam Konstantino proklamis sian Edikton de Milan', la jaron 313<sup>a</sup>.

Sed ne gravas, tial, ĉu oni estas kristano por ĝojiĝi kaj ĝojigi aliajn homojn pro tio, ke nova jaro venos baldaŭ, eble la tagon, kiam oni legas tiujn ĉi vortojn, kaj deziri ĉion bonan pri la sekvontaj tagoj de la tuta jaro 2020.

*Feliĉajn Kristnaskon  
kaj Novan Jaron deziras al vi*

*Kajeroj el la Sudo!*

Don' Hŭan' iris hejmen senkredante tion, kio ĵus okazis. Li al kutimiĝis al tio, ke virinoj ŝatas lin pro nenia kialo, sed tiu ĉi estis ĵusedziniĝinta. Kaj ŝi sugestis, ke se ŝi konintus lin antaŭe, ŝi ne edziniĝus!

Timetigis lin, ke ŝia edzo evidente jaluzas. Tio povus kaŭzi problemojn en la estonto. Sed ili estas vojaĝontaj al Turkujo kaj ĝuos tie tutan duonmonaton, pli ol sufiĉe forgesi pri li. Eble ŝi forgesos pri tio, kiu li estas, post nur kelkaj tagoj, eĉ se li neniam forgesos tiujn minutojn ĉe la virina necesejo. Sed knabino, li scias, estas nekonstantaj kaj vanaj, kaj ili forgesas tiujn belajn momentojn, kiujn oni havas en vivo. Krom Elvirin', kompreneble.

Ĉar ŝi estas ĵus tie, ĉe lia hejmpordo.

«Diable, Elvirin'! Kion diable vi faras ĉi tie? Kion vi volas?»

«Ĉu mi ne povas eniri?»

«Ne. Vi havas bremsantan ordon. Vi krimiĝas nun».

«Mi scias, Don' Hŭan'. Sed vi ne denoncos min...»

«Ĉu ne? Mi raportos pri vi tuj se vi ne malaperas ekde minuto», li diris. Li avantaĝis ŝian surprizon por eniri sian hejmon kaj fermi la pordon.

«Don'! Malfermu tuj!»

Sed li prenis sian telefonon kaj vokis policon. Kvin minutojn poste ŝi ankoraŭ sidas ĉe lia pordo kiam du policanoj frapis lian pordon kaj diris, ke estas la polico. Li malfermis kaj klarigis al ili pri ĉio:

«Sinjoro», li diris, «ĉi tiu virino havas bremsantan ordon per kiu ŝi ne povas esti pli proksime ol kvar cent metroj de mi. Bonvolu, preni ŝin for. Ĉi tie estas kopio de la bremsa».

Li montris ĝin al policanoj, kiuj legis ĝin kaj poste raportis al policejo per radio. Poste ili prenis ŝin el la domo de Don' Hŭan' en la policejon kaj plenumis raporton pri ŝi. Ŝi devis resti tie ĝis kiam la juĝisto venis la sekvintan tagon. Tiam ŝi devis pagi monpunon kaj ricevis averton, ke ŝi ne faros tion denove, ĉar venontfoje ŝi devos resti kelkajn tagojn en karcero. Ŝi provis konvinki la juĝiston per siaj larmoj, sed okazis, ke la juĝisto estas virino, kiu scias pri tiuj trukoj kaj ŝi ridis pri tio.

Dume, hejme Don' Hŭan' pensadas pri la eventoj de sia tago. Elvirin' estas pli freneza ol li kredis. La problemo, kiun li ne komprenas nun estas Ŝerlin'.



Ŝi edziniĝis la antaŭan tagon. Ŝi nun iras en Turkujon mielmonate, kaj ŝi ankoraŭ havas tempon fiki lin. Kial? Li memoris pri tio, kio ĵus okazis: li konis ŝin je la evento de la morto de la patro de Anin', kaj ŝi estis mirinda atestantino. Ĉiel, temis pri la parolo de Anin' kontraŭ tiu lia, kaj oni liberigus lin evidente, kvankam eble post longa tempo, se ŝi ne atestintus. Ĉu ŝi postulis pagon por tio? Kiel povas ekedzino ekenamiĝi al alia viro la tagon antaŭa kaj tamen edziniĝi la venintan? Li esperas, ke li ne vidos ŝin denove... Bone, amindumi al ŝi estis agrabla, kaj la fakto, ke ŝi apartenas al alia viro donis al li ekstran dozon pri ekscito, sed li timis ĉar ŝia edzo povus ekscitiĝi pro alia, diversa pasio. Oni neniam antaŭe prenis lin en policejon. Li decidis, ke li estos pli zorgema pri virinoj en la estonto. Li taksis sian personan pacon multe pli ol esti kun virino. Li iam legis hispanan teatraĵon kies ĉefrolulo donis al ĉiu virino nur tri tagojn: unu por koni ŝin, alian por ĝui ŝin, kaj la trian por forgesi ŝin. Li dezirus, ke li povus forgesi ilin, aŭ pli bone forgesigi ilin pri li por ĉiam. Tamen, ŝajnis, ke li havas magneton por virinoj: li ne serĉas ilin, sed ili venas al li same kiel muŝoj iras al mielkuko, kaj li ne vere scias kial, sed eĉ kiam li ne agrable traktas ilin, ili algluas al li. Fatke li estis insulta al Elvirin', kaj li eĉ vokis policon liberiĝi pri ŝi, sed li nun timas, ke ŝi ne haltos ĝeni lin. Ŝi aspektas psikopatino. Tial li pensas, ke li devas iri tre for, tiel ke ŝi ne plu trovos lin. Sed tio estus maljusta!

Aliaj virinoj simple rompis lian koron. Unu el ili mortis ĉar sia fianĉo vidis ŝin kun li kaj batadis ŝin. Li ankoraŭ estas en karcero, sed Don' sentis sin kulpa kaj domaĝis, ke ŝi mortis. Jes, ĉio, kion oni faras, havas sekvojn, ĉu bonajn ĉu malbonajn.

Kaj Anin', kio pri Anin'? Agrabla ŝi estas. Ŝi estis lian fianĉinon, bone. Ĝis kiam ŝi eksciis pri Elvirin'. Tiam ŝi freneziĝis, ankaŭ. Ŝi implikis sian paĉjon kaj tio estis tre malbona por ĉiuj, aparte por li. Don' Ĥŭan' decidis antaŭ longe agi facile pri virinoj, kvankam ili ne sukcesis rimarki. Tamen, li nun havas pacon. Post lasi aferojn kun Anin' kaj Elvirin', li provis reiri en sian senvirinan vivon. Lia ferio estis komenconta, kaj li pensis, ke estus bone viziti Germanion, finfine. Li volis koni Germanion delonge, ĉar li studis la germanan lingvon en lernejo. Estus bona ŝanĝo scena, kaj bone rompi kun lia ĉiutaga vivo, lia rutino. Li flugis al Berlino, kaj trovis tre agrable ŝanĝi la anglan pluvon per germana suna mateno.

Post la enterigo de la Faraono Egipto revenis al la ordinara vivmaniero, kaj Ramzes XIII al la ŝtataj aferoj.

En la monato Epifii (aprilo, majo), la nova monarĥo vizitis la urbojn trans Teboj, sur la bordoj de Nilo. Li estis en Sni, urbo tre komerca kaj industria, kie troviĝis la templo de Kneph, aŭ la "animo de la mondo". Li vizitis Edfu'n, kies templo kun deketaĝaj pilonoj posedis grandegan bibliotekon de papirusoj, kaj sur la muroj skribitan kaj pentritan kvazaŭ enciklopedion de la tiama geografio, astronomio kaj teologio. Li haltis en la ŝtonminejoj de Ĥennu; en Nubio aŭ Kom-Ombo li faris oferon al Horus, la dio de la lumo, kaj al Sebek, kiu estas la spirito de la krepusko. Li estis sur la insulo Ab, kiu inter la nigraj ŝtonegoj havis aspekton de smeraldo, naskis la plej bonajn daktilojn kaj estis nomata la ĉefurbo de l' elefantoj; ĉar tie koncentriĝis la tuta komerco de la eburo. Fine li vizitis la urbon Sunnu, ĉe la unua katarakto de Nilo, estis en la grandegaj minejoj de granito kaj sienito, kie oni fendis la ŝtonegojn per kojnoj, saturitaj de akvo, kaj hakis obeliskojn, naŭ etaĝojn altajn.

Ĉie, kie sin montris la nova sinjoro de Egipto, la regnantoj salutis lin kun furioza entuziasmo. Eĉ la krimuloj, laborantaj en la minejoj, kies korpo estis kovrita de necikatriĝintaj vundoj, eĉ ili ĝuis la feliĉon: la Faraono ordonis liberigi ilin de la laboro por tri tagoj.

Ramzes XIII povis esti kontenta kaj fiera: neniu Faraono dum sia venka triumfo estis tiel akceptata, kiel li dum sia paca ekskurso. La nomarĥoj, skribistoj kaj ĉefpastroj, vidante la senliman konfidon de la popolo al la nova Faraono, kliniĝis antaŭ lia povo kaj murmuretis inter si:

—La popolaĉo estas kvazaŭ aro de bovoj, kaj ni kiel prudentaj kaj ŝparemaj formikoj. Ni respektu do la novan sinjoron, por ke ni ĝuu la sanon kaj gardu niajn domojn de la ruino.

Tiamaniere la opozicio de la altranguloj, tre forta antaŭ kelke da monatoj, hodiaŭ eksilentis kaj cedis la lokon al senlima humileco. La tuta aristokratio kaj pastraro falis sur la vizagon antaŭ Ramzes XIII; sole Mefres kaj Herhor restis neflekseblaj.

Ne estas do mirinde, ke kiam la Faraono revenis de Sunnu Tebojn, tuj en la unua tago la granda trezoristo alportis al li malbonajn novaĵojn.

—Ĉiuj temploj —diris li —rifuzis al la trezorejo la krediton kaj plej humile petegas vian sanktecon, ke en la daŭro de du jaroj vi ordonu pagi la sumojn, pruntitajn de ili...

—Mi komprenas —respondis la monarĥo —tio estas la verko de la sankta Mtefres!... Kiom ni ŝuldas al ili?

- Ĉirkaŭ kvindek mil talentojn...
- Kvindek mil talentojn mi devas pagi en la daŭro de du jaroj!... —ripetis la Faraono. —Kaj poste, kio ankoraŭ?...
- La impostoj alfluas tre malrapide —diris la trezoristo. —Jam de tri monatoj ni ricevas apenaŭ la kvaronon de tio, kion oni ŝuldas al ni...
- Kio okazis?

La trezoristo estis embarasita.

- Mi aŭdis —diris li —ke iuj homoj klarigis al la kamparanoj, ke dum la regado de via sankteco ili povas ne pagi la impostojn...
- Oh! Oh!... —ekkriis Ramzes ridante —tiuj homoj ŝajnas al mi tre similaj al la nobla Herhor... Li do volas mortigi min per malsato?... Kiel vi pagas la kurantajn elspezojn? —aldonis li.
- Laŭ la ordono de Hiram pruntas al ni Fenicianoj —respondis la trezoristo. —Ni jam prenis ok mil talentojn...
- Sed vi donas al ili kvitancojn?
- Kvitancojn kaj garantiojn... —eksopiris la trezoristo. —Ili diras, ke tio estas simpla formalajo; tamen ili loĝiĝas en la bienoj de via sankteco kaj forprenas de la kamparanoj ĉion, kion ili povas...

Ebriigita de la akcepto de la popolo kaj de la humileco de l' riĉuloj, la Faraono ne koleris plu kontraŭ Herhor kaj Mefres. La tempo de la kolero pasis, venis la momento de l' agado, kaj en la sama tago Ramzes kombinis planon.

En la sekvinta tago li alvokis siajn plej konfidindajn homojn: la ĉefpastron Semon, la profeton Pentueron, la favoraton Tutmozison kaj la Fenicianon Hiramon. Kiam ili kunvenis, li diris:

- Kredeble vi scias, ke la temploj postulis, ke mi redonu al ili la sumojn, kiujn pruntis de ili mia eterne vivanta patro. Ĉiu ŝuldo estas sankta, kaj tiun de la dioj mi dezirus pagi antaŭ ĉio. Sed mia trezorejo estas malplena, ĉar eĉ la impostoj alfluas neakurate... Kaj tial mi opinias, ke la ŝtato estas en danĝero kaj mi estas devigita, por havi monajn rimedojn, min turni al la trezoroj, gardataj en Labirinto.

La du pastroj faris maltrankvilan movon.

- Mi scias —daŭrigis la Faraono —ke laŭ niaj sanktaj leĝoj, mia dekreto ne sufiĉas por malfermi al ni la kelojn de Labirinto. Sed la tieaj pastroj klarigis al mi, kion mi devas fari. Mi devas kunvoki reprezentantojn de ĉiuj klasoj de Egipto, po dek tri de ĉiu klaso, kaj ricevi de ili konfirmon de mia volo...

En ĉi tiu momento la Faraono ekridetis kaj daŭrigis:

- Hodiaŭ mi alvokis vin, por ke vi helpu min kunvoki la reprezentantojn de la klasoj, kaj jen kion mi ordonas al vi: vi, nobla Sem, elektos al mi dek tri

pastrojn kaj dek tri nomarĥojn... Vi, pia Pentuer, venigos de diversaj nomesoj dek tri kamparanojn kaj dek tri metiistojn... Tutmozis liveros dek tri oficirojn kaj dek tri nobelulojn, la princo Hiram dek tri komercistojn. Mi deziras, ke la reprezentantoj plej baldaŭ kunvenu en mia palaco en Memfiso kaj, ne perdante tempon en vana babilado, decidu, ke Labirinto devas liveri monon al mia trezorejo...

—Mi kuraĝas rememorigi al via sankteco —interrompis la ĉefpastro Sem —ke en la konsilo devas ĉeesti la noblaj Herhor kaj Mefres, kaj ke ili posedas la rajton, eĉ la devon kontraŭstari, ke oni tuŝu la trezorejon de Labirinto.

—Bone, mi plene konsentas... —vive respondis la Faraono. —Ili prezentos siajn motivojn, mi miajn. La kunvenintoj decidis, ĉu la ŝtato povas ekzisti sen mono kaj ĉu prudente estas amasigi trezorojn en keloj, dum la registaron minacas la mizero.

—Per kelke da safiroj, kiuj kuŝas en Labirinto, oni povus pagi ĉiujn feniciajn ŝuldojn!... —diris Hiram. —Mi tuj iros inter la komercistojn kaj liveros ne dek tri, sed dek tri mil tiajn, kiuj voĉdonos laŭ la ordonoj de via sankteco...

Dirinte tion, la Feniciano falis sur la vizaĝon kaj adiaŭis la monarĥon.

Kiam Hiram foriris, la ĉefpastro Sem diris:

—Mi ne scias, ĉu bone estas, ke en la kunveno partoprenis fremdulo.

—Li devis partopreni!... —ekkriis la Faraono. —Ĉar li ne sole havas grandan influon je niaj komercistoj, sed kio estas pli grava, li liveras al ni hodiaŭ monon... Mi volis konvinki lin, ke mi pensas pri tio, kion mi ŝuldas al li, kaj ke mi havas rimedojn por pagi ĝin...

Sekvis silento, kiun profitis Pentuer, dirante:

—Se via sankteco permesos, mi tuj forveturos, por kolekti la kamparanojn kaj metiistojn. Ĉiuj ili voĉdonos por mia sinjoro, sed el la amaso oni devas elekti la plej saĝajn.

Li adiaŭis la Faraonon kaj foriris.

—Kaj vi, Tutmozis?... —demandis Ramzes.

—Mia sinjoro —diris la favorato —mi estas tiel certa pri via nobelularo kaj armeo, ke anstataŭ paroli pri ili, mi kuraĝos prezenti al vi mian propran peton...

—Ĉu vi deziras monon?

—Tute ne. Mi volas edziĝi...

—Vi?... —ekkriis la Faraono. —Kiu virino meritis de la dioj tian feliĉon?

—Tio estas la bela Hebron, la filino de la plej nobla teba nomarĥo, Antef... —respondis ridante Tutmozis. —Se via sankteco bonvolos prezenti mian peton al ĉi tiu respektinda familio... Mi volis diri, mia amo al vi pligrandiĝos, sed mi silentos, ĉar mi mensogas...

La Faraono frapis lin je la ŝultro.

—Bone... bone!... Ne ripetu al mi tion, pri kio mi estas certa —diris li. —Mi veturos morgaŭ al Antef kaj, pro la dioj, ŝajnas al mi, ke en la daŭro de kelke da tagoj, mi aranĝos vian edziĝon. Kaj nun vi povas iri al via Hebron...

Restinte sola kun Sem, lia sankteco demandis:

—Via vizaĝo estas malgaja... Ĉu vi dubas, ke oni povos trovi dek tri pastrojn, pretajn plenumi miajn ordonojn?...

—Mi estas certa —respondis Sem —ke preskaŭ ĉiuj pastroj kaj nomarĥoj faros tion, kio estos necesa por la feliĉo de Egipto kaj por la kontenteco de la Faraono... Sed bonvolu ne forgesi, sinjoro, ke en la aferoj de la trezorejo de Labirinto la definitivajn decidon faras Amon...

—La statuo de Amon en Teboj?...

—Jes.

La Faraono malestime svingis la manon.

—Amon —diris li —tio estas Herhor kaj Mefres... Ke ili ne konsentos, mi scias; sed mi ne intencas oferi la ŝtaton pro la obstino de du homoj.

—Via sankteco eraras —respondis Sem. —Estas vero, ke tre ofte la ŝtatuoj de l' dioj faras tion, kion deziras iliaj ĉefpastroj, sed... ne ĉiam!... En niaj temploj, sinjoro, okazas iafoje, eksterordinaraj kaj misteraj aferoj... La statuoj de l' dioj iafoje mem faras kaj parolas, kion ili volas...

—En tia okazo mi estas tute trankvila —interrompis lin la Faraono. —La dioj konas la staton de la lando kaj legas en mia koro... Mi volas, ke Egipto estu feliĉa, kaj ĉar nur tion mi celas, neniu saĝa kaj bona dio povas min malhelpi.

—Realigu la vortoj de via sankteco!... —murmuretis la ĉefpastro.

—Vi volas ankoraŭ ion diri al mi —demandis Ramzes, vidante, ke lia religia anstataŭanto prokrastas la adiaŭon.

—Jes, sinjoro. Mi havas la devon rememorigi al vi, ke ĉiu Faraono, akceptinte la povon kaj enteriginte sian antaŭulon, tuj devas zorgi pri la konstruo de tombo por si kaj de templo por la dioj.

—Jes, jes! —ekkriis la sinjoro. —Pli ol unu fojon mi pensis pri tio, sed ne posedante monon mi ne rapidas ordoni ion. Ĉar vi komprenas —aldonis li vive —ke se mi konstruos ion, tio estos io granda, kio devigos Egipton ne baldaŭ forgesi pri mi...

—Ĉu via sankteco volas havi piramidon?...

—Ne. Mi ja ne konstruos pli grandan piramidon, ol tiu de Ĥeopso, nek pli grandan templon, ol tiu de Amon en Teboj. Mia ŝtato estas tro malforta por plenumi grandegajn verkojn... Mi do volas fari ion, tute novan, ĉar mi diros al vi, ke niaj konstruaĵoj jam tudas min. Ĉiuj similas unu alian, kiel la homoj, kaj diferencas nur per la mezuroj, kiel plenaĝa homo diferencas de infano.

- Do?... —demandis la ĉefpastro, larĝe malfermante la okulojn.
- Mi parolis kun la Greko Dion, kiu estas mia plej eminenta arĥitekto, kaj li laŭdis mian planon —daŭrigis la Faraono. —Kiel tombon por mi mi volas konstrui rondan turon, kun eksteraj ŝtuparoj, tian, kia estas en Babelo... Mi konstruos ankaŭ templon, ne al Oziriso aŭ Izido, sed al la Sola Dio, kiun kredas ĉiuj: Egiptanoj, Ĥaldeanoj, Fenicianoj kaj Hebreoj... Mi volas, ke ĉi tiu templo estu simila al la palaco de la reĝo Assar, kies planon Sargon donacis al mia patro...
- La ĉefpastro skuis la kapon.
- Tio estas grandaj intencoj, mia sinjoro —respondis li —sed ne plenumebaj... La babilonaj turoj pro sia formo estas malfortikaj kaj facile renversiĝas, niaj konstruaĵoj daŭras jarcentojn... Oni ne povas konstrui templon al la Sola Dio, ĉar li bezonas nek manĝaĵojn, nek trinkaĵojn, kaj la tuta mondo estas Lia loĝejo. Kie do estas la templo, kiu povus enteni Lin? Kie la pastro, kiu kuraĝus fari al Li oferojn?...
- Bone, ni do konstruu templon al Amon Ra —interrompis la Faraono.
- Jes, sed ne tian, kia estas la palaco de l' reĝo Assar. Ĉar ĝi estas asiria konstruaĵo, kaj al ni, Egiptanoj, ne konvenas imiti la barbarojn...
- Mi ne komprenas vin... —interrompis la monarĥo iom incitita.
- Aŭskultu min, nia sinjoro. —diris Sem. —Rigardu la limakojn, el kiuj ĉiu havas alian konkon: unu kunvolvitan, sed platan, alia kunvolvitan, sed longforman, alia —similan al kesto... Same ĉiu popolo faras konstruaĵojn, konformajn al ĝiaj raso kaj gusto. Memoru ankaŭ, ke la egiptaj konstruaĵoj tiel diferencas de la asiriaj, kiel Egiptanoj de Asirianoj. Ĉe ni la principa formo de ĉiu konstruaĵo estas la detranĉita piramido, la plej fortika el ĉiuj formoj, kiel Egipto estas la plej fortika el ĉiuj ŝtatoj. Ĉe Asirianoj la principa formo estas la kubo, kiu facile difektiĝas kaj detruigiĝas. Asiriano, fiera kaj vanta, metas siajn kubojn unu sur alia kaj konstruas multetaĝan domon, sub kies pezo disiĝas la tero. Egiptano, humila kaj prudenta, metas siajn detranĉitajn piramidojn unu post alia. Tiamaniere ĉe ni nenio pendas en la aero, sed ĉiu parto de l' konstruaĵo sin apogas sur la tero. Jen kial niaj konstruaĵoj estas longaj kaj eternedaŭraj, la asiriaj —altaj kaj rompeblaj, kiel ilia ŝtato, kiu hodiaŭ rapide leviĝas, kaj de kiu post kelke da jarcentoj restos nur ruinoj. Asiriano estas kriema memlaŭdulo kaj en siaj konstruaĵoj ĉion metas ekstere: kolonojn, pentraĵojn, skulptaĵojn. La modesta Egiptano kaŝas la plej belajn skulptaĵojn kaj kolonojn en la interno de l' temploj, kiel saĝulo, kiu la altajn pensojn, sentojn kaj dezirojn kaŝas sur la fundo de sia koro, kaj ne ornamas per ili sian bruston aŭ dorson. Ĉe ni ĉio bela estas kaŝita: ĉe ili ĉion oni faras por montrado. Asiriano, se li povus, distranĉus sian stomakon, por montri al la mondo kiel delikatajn aĵojn li manĝas....
- Parolu... parolu!... —intermetis Ramzes.

—Ne multe restis al mi por diri —daŭrigis Sem. —Mi volas nur turni vian atenton, sinjoro, al la ĝenerala formo de niaj konstruaĵoj. Kiam antaŭ kelke da jaroj mi estis en Ninivo, mi rigardis la asiriajn turojn, fiere leviĝantajn super la tero; ŝajnis al mi, ke tio estas furiozaj ĉevaloj, kiuj disŝirinte la bridojn, stariĝas sur la postaj piedoj, sed tuj falos, aŭ eble rompos al si la kruojn. Kontraŭe, provu via sankteco ekrigardi de alta punkto egiptan templon. Kion ĝi rememorigas? Homon, kiu preĝas, kuŝante sur la tero. La du pilonoj estas la manoj, levitaj al la ĉielo. La du muroj, ĉirkaŭantaj la korton, estas la brakoj. La ĉambrego de la kolonoj aŭ ĉiela estas la kapo; la ĉambroj de la dia apero kaj de la oferaĵoj estas la brusto, kaj la sekreta sanktejo estas la koro de la pia Egiptano. Nia templo instruas nin, kiaj ni devas esti: "Havu manojn potencajn, kiel la pilonoj —diras ĝi al ni —kaj brakojn fortajn, kiel la muroj. Havu en la kapo saĝon tiel vastan kaj riĉan, kiel la vestiblo de l' templo, animon puran, kiel la ĉambroj de la dia apero kaj de la oferaĵoj, kaj en la koro havu dion, ho Egiptano!..." La asiriaj konstruaĵoj diras al sia popolo: "Leviĝu super la homojn, Asiriano, portu la kapon pli alte, ol la aliaj!... Vi faros nenion grandan en la mondo, sed almenaŭ vi lasos multe da ruinoj..." Ĉu do vi havus kuraĝon, sinjoro —konkludis la ĉefpastro —konstrui ĉe ni asiriajn templojn, imiti la popolon, kiun Egipto rigardas kun abomeno kaj malestimo?...

Ramzes ekmeditis. Malgraŭ la leciono de Sem, ankoraŭ nun li opiniis, ke la asiriaj palacoj estas pli belaj, ol la egiptaj. Sed li tiel malamis Asirianojn, ke lia koro komencis ŝanceliĝi.

—En tia okazo —respondis li —mi prokrastos la konstruon de la templo kaj de mia tombo. Kaj vi, saĝuloj, kiuj estas fidelaj al mi, preparu planojn de tiaj konstruaĵoj, ke ili transigu mian nomon al la plej malproksimaj generacioj.

"Superhoma fiero plenigas la animon de ĉi tiu junulo!..." —diris al si la ĉefpastro kaj malĝoja adiaŭis la Faraonon.



# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj



---

<http://www.gazetoteko.com/hale/kels111.pdf>

---

*Numero 111<sup>a</sup> - Decembron 2019*



ISSN 1886-1938 (printita)  
ISSN 1886-1997  
Depósito legal: Z-2398-88